Små grodorna estas dancludo, kiu en Svedio estas plejparte rilata al somermezaj festadoj kaj dancado ĉirkaŭ la somermeza stango, sed foje okazas dum dancado ĉirkaŭ la kristnaska arbo kaj sur la dudeka de Knut (nomo en la sveda kalendaro la 13^a de januaro). La danco estas farita kaŭrante kiel ranoj, kaj kiam la vortoj "oreloj" kaj "vostoj" estas kantataj, la dancantoj svingas la manojn ĉe siaj oreloj kaj postaĵoj. Komponisto nekonata. Se vi volus aŭskulti la kanton svede:

<https://www.youtube.com/watch?v=cqAiPkgTpy4>

Små grodorna är en danslek, som i Sverige främst förknippas med midsommarfirande och kring midsommarstång, men förekommer ibland när det dansas runt julgranen och på tjugondedag Knut. Dansen utförs hoppande på huk som grodor, och då orden öron och svansar sjunges viftar de dansande med händerna vid sina öron och svanskotor.

Kompositör: Okänd.

||: Ranetoj ja, ranetoj ja,
amuzaj estas vi :||

||: Små grodorna, små grodorna
är lustiga att se :||

||: Kuakakak, kuakakak, kuakakakakak :||

||: Ne havas, ne havas
orelojn, vostojn vi :||

||: Ej svansar, ej svansar
ej öron hava de :||

||: Kuakakak, kuakakak, kuakakakakak :||



<https://www.youtube.com/watch?v=Nw6V49hlx98>

Kajto per siaj kantoj ofte rakontas ion interesan. Jen historio (vidu la ligilon supre) pri ranoj, kies kuvo staris sub tegmento. Pli kaj pli akvo mankis al ili. Se ili nur saltus, ili travivus, sed ili nur kriis por havi helpon kaj ne saltis.

Do – instrumoralo: agu mem! Ne plendu pri ne bone funkcia Esperanto-movado – strebu mem plibonigi ĝin!

Teksto de "Ran-kvarteto" de la Kajto:

Sub tegmento staris kuvo
Dum somera densa pluvo
Sed tegmento baris pluvo
Pluvo falis apud kuvo
Ĉar el pluvo kuv' ne havis
Pro la soifo ranoj kvakis
Ĉar el pluvo kuv' ne havis
Pro la soifo ranoj kvakis

*Kvavak kvavak kvak kvak kvak
Kvavak kvavak kvak kvak kvak
Kava kuvo vane vakas
Kvak kvak kvak kvak kvak kvak kvak
Kvankam ni por pluvo kvakas
Kvodlibet' de ĥor' kvakanta
En la kuva kav' vakanta
Kvakas kvere akvoavo
Akvon al la kuvokavo
Kvavak kvavak kvak kvak kvak
Kvavak kvavak kvak kvak kvak*

Tio pravas: se dum pluvo
Staras sub tegment' la kuvo
Ranoj vane kvaki povas
Se je salto sin ne movas
Do ne kvaku kiel ranoj
Karaj gesamideanoj
Do ne kvaku kiel ranoj
Karaj gesamideanoj



Dormeto dum la tago

pligrandigas vian forton, memoron kaj efikon. Tion skribas sciencistoj en *Forskning och Framsteg* (Esplorado kaj Progreso).

La sveda vorto por dormeto estas *tupplur* "virkokdormeto", aludante la modon, kiun la virkoko uzas por refortiĝi per mallonga dormeto. Ofte ĝi tiam staras per unu kruro.

La ideala tempo por dormeto, laŭ *Forskning och Framsteg*, estas inter la 13^a kaj la 16^a horoj. Strange – tiam la suno ja donas al ni forton. Evidu dormeti inter la 16^a kaj la 20^a h. Strange – tiam mi de tempo al



tempo bezonas dormeton.

Kiom longe daŭrus dormeto? 20 – 60 minutoj plibonigas la memoron, sed ankaŭ 2 – 20 minutoj da dormeto plibonigas vian reakcikapablon kaj memoron.



En Ĉinio troviĝas sur la stratoj dormkabanjoj. Tie oni povas parki sian lacan korpon dum mallonga tempo. Jes, kial ne?

Ĝus estis tempoŝanĝo al somera tempo. La ŝanĝo okazigas debaton. Multaj diras ke la dormoritmo estas detruita. Mi rekomendas al ili dormeti iam dum la tago. /Siv

Galinago

de Renate Säfström



Galinago en Vallda Sandö.

La matenaj sunradioj varmigas kaj la frostaj temperaturoj cedos al kelkaj gradoj super la nulo. Tie sur malgranda herbotufo kuŝas la galinago kaj pensas, ke estas vere agrable.

Morgonens solstrålar värmer och köldgraderna får ge vika för några plusgrader. Där på en liten grästuva ligger enkelbeckasinen och tycker att det är riktigt skönt.

FOTO
FÖR LIVET

FOTO
FÖR LIVET

La lokaj aŭtoritatoj de Gotenburgo

de Jesper Berglund



Mi intencas raporti pri tio, kio okazas en la komunuma konsilantaro en ĉiu numero. La konsilantaro estas la loka parlamenta

assembleo, kiu estas elektita en parlamentaj balotadoj ĉiun kvaran jaron.

Por ke niaj internaciaj legantoj sentiĝu hejme, ni unue prezentos la ok partiojn, kiuj sidas en la konsilantaro. Ni prezentas ilin en ordo de grandeco bazita sur la balotrezulto.

La Socialdemokratoj (S)

(Socialdemokraterna) estas klasika skandinava socialdemokrata partio. 26,44% en la elekto.

La Moderuloj (M) (Moderaterna). La granda partio dekstre. Estas kaj konservativuloj kaj liberaluloj ĉi tie. 17,12% en la elekto.

La Maldekstra Partio (V) (Vänsterpartiet). Moderna socialisma kaj feminisma partio. Antaŭe la Komunista Partio. 15,82% en la elekto.

La Svediaj Demokratoj (SD)

(Sverigedemokraterna). Partio fondita de novnazioj kun klare faŝismaj trajtoj (kvankam ĝi ne konsentas al tia priskribo *n.d.red*). Kontraŭ enmigrado kaj retoriko proksima al tiu de Trump. 10,75% en la elekto.

La Demokratoj (D) (Demokraterna – troviĝas nur en Gotenburgo), partio kiu estas vidita de multaj kiel disigo el M. Fokuso pri esti kontraŭ trajnotunelo konstruata sub Gotenburgo. 6.14% en la elekto.

La Verda Partio (MP) (Miljöpartiet de gröna). Partio sur ekologia bazo. Provas resti ekster

la konflikto inter dekstro kaj maldekstro. 5.99% en la elekto.

La Liberaluloj (L) (Liberalerna). La klasika liberala partio en Svedio. Transiris de socia liberala fokuso al pli novliberala. 5.54% en la elekto.

La Kristandemokratoj (KD)

(Kristdemokraterna). Partio proksima al la pentekosta movado. Konservema. 4.15% en la elekto.

Centra Partio (C). Historia partio por kampanoj. Nuntempe pli ĝenerale liberala kaj kontraŭrasisma. 4.00% en la elekto.

Aliaj partioj ricevis entute 4,05% kaj ne membriĝas en la konsilantaro.

La parlamenta situacio ne estas tute simpla. Regantoj estas koalicio inter S, V kaj MP, sed tiuj partioj havas nur 40 el 81 sidlokoj en la konsilantaro. Ĉi tio signifas, ke ili ne povas decidi kiel ili volas. Ĉiuj partioj estas ankaŭ en la Komunuma Estraro. Kaj en la konsilantaro kaj en la komunuma estraro, C havas la ekvilibrantan pozicion.

M, L, D kaj KD havas kunlaboron. En la lasta oficperiodo, M, L, KD kaj C havis kunlaboron, sed ĉar M kaj KD komencis negoci kun SD, C ne volas partopreni, sed anstataŭe estas en libera opozicio. SD ankaŭ estas ekster formalaj kunlaboroj.

La konsilantaro kunsidas unufoje monate kaj ĉiufoje traktas multajn aferojn. Iuj estas malgrandaj kazoj kaj iuj estas grandaj. La kunveno en marto traktis, interalie, aferojn de "reguligo pri fajromalpermesoj", "suplementa buĝeto" kaj "agadplano por bona akvostatuso en Gotenburgo".

Plejparto de la debato temis pri la buĝeto. La ekonomia situacio estas malfacila. Svedio

havas altan inflacion. La registaro de Svedio, kiu konsistas el M, L kaj KD kun la subteno de SD, ne disponigis tiom da mono kiom necesas por ke la komunumoj povu konservi siajn servojn. Malgraŭ tio, la komunumo pliigis la kadron de ĉiuj administracioj je 6%. Ne sufiĉas. Do nun la konsilantaro prenis

suplementan buĝeton por kovri kelkajn el la truoj, kiuj estiĝis post kiam la buĝeto estis aprobita en decembro. La partioj ne konsentis pri kio en la buĝeto havu antaŭrangon. Sed fine venkis la propono de la estraro.

Vizito de la printempo

– Ĉu mi povas ie pendigi mian dikan blankan palton, demandas la granda giganto staranta ekster mia pordo.

Li havas grandan blankan ĉapon tiritan malsupren super siaj okuloj kaj lia voĉo estas glacie malvarma. Li apogas sin sur kurba bastono kaj havas glacipendaĵojn en siaj haroj kaj barbo. Mi vidas en la densa matena nebulo, kiel iuj frostsentemaj birdoj sidas kaj tremas sur la sebaĵ buloj, kiujn mi pendigis.

– Mi estas laca, li daŭrigas, kaj mi sopiras al la vera lumo.

Li malrapide foriras de la pordo kaj mi aŭdas la krakon kaj kraketon de la lasta glacio, kiu estas etendita kiel malvarma kovrilo sur la korto. Li iras al la arbaro.

– Devas esti ŝanĝo, mi aŭdas lin murmuri dum li iras al la granda piceo. Nun mi vidas, kiel li mallerte manipulas sin el la granda, peza mantelo kaj lasas ĝin fali sur la teron kie li staras. Ĝi aspektas kiel neĝbulo, mi pensas, dum mi vidas, kiel per sia giganta brako li svingas sian grandan ĉapelon en kurblinio iom pli for. Estos ankaŭ alia neĝbulo. La granda veŝto iras en malsama direkto. Post iom da tempo mi vidas, kiel malgrandaj blankaj amasoj estas disĵetitaj ĉirkaŭe.

Mi sekvas la spektaklon mire kaj vidas kiel ĉio ĉirkaŭ mi ŝanĝiĝas de momento al momento. La granda giganto apud la arbo ŝanĝis sian karakteron. Nun li estas bela juna viro kun larĝaj ŝultroj kaj sekal-blonda hararo, kiu kongruas kun la koloro de la bruna, fortika



kostumo, kiun li portas. Mi varmiĝas interne kaj mia koro batas, kiam mi vidas, kiel li venas al mi. La sento de la varmo batalanta kontraŭ la malvarmo pulsadas kaj ribelas en mia sango. Subite la paralizo malaperis kaj mi kuras renkonte al li.

– Mi ne rekonis vin, mi flustras al lia orelo, kiam li kliniĝas kaj donas al mi varman brakumon.

– Ne, ne ĉiam estas tiel facile rekoni min, li respondas per sia varma voĉo, kiu penetras profunde en mian mallumon kaj lumigas ĝin.

– La printempo ĉiam ŝteliras, sed tenu mian manon kaj ni malrapide iros al la somero.

De Ingegerd Granat, februaro 2013

Printempo – venu!

*Kun ĝojo ni en Gotenburgo memoras **Aira Kankkunen** kiel bonan instruiston, kiu igis siajn gelernantojn skribi noveletojn. Tiujn ŝi kolektis en libretoj, kiujn ni ankoraŭ povas trovi en nia biblioteko en Stannum. Jen unu el ŝiaj propraj kontribuoj, **Printempo venu!** Ĝi jam aperis en *Ora Ĵurnalo* n-ro 51, sed indas esti represita nun kiam la printempo venas denove. /Siv*



Tip-tip-tip! Ĉu vere, ĉu ili jam degelas – la pendoglacioj sur tegmentrandoj.

– Printempo alvenos, estas jam tutproksime! mi kriis kaj kuris eksteren por scii, ĉu vere la pendoglacioj, grandegaj, tutan vintron kreskintaj, nun degelas.

Tio estis unua signo de la alvenonta printempo. Ni malfiksis la pendoglaciojn. Estis danĝere lasi ilin pendu; ili ja estis pezaj kaj akraj. Malfiksige spante, ili estus povinta fali sur homon.



Post ĉi tiu agado ni atendis la sekvan, la degeladon de nia kortoglacio. Ni loĝis en lernejo; nia patro estis instruisto. La korto estis piedpremita de lernantoj dumvintre tiel forte, ke la neĝo malmoliĝis. Unue degelas movebla neĝo, poste restis nur malmola glacio, kiu iom post iom travidebliĝis, kaj tiam estis la tempo helpi la alvenontan printempon. Per fosiloj kaj ferstangoj ni dispecigis la glacieron, malfiksis la pecojn el la tero kaj renversis ilin, por plirapidigi la degeladon. Baldaŭ la tuta korto estis kiel

laĝeto, sur kiu ni saltis de unu glacipeco al la aliaj imagante, ke ni kuras sur maraj glacipecoj. Kompreneble okazis, ke kelkaj falis kaj vere malsekiĝis, ĉar tiatempe oni ne havis la nuntempajn, akvimunajn ŝirmvestojn, sed ne gravis – ni ja havis saŭnon, kie kaj vestoj kaj infanoj rapide sekiĝis.

Kiam la suno degeligis la movneĝon ĉirkaŭ la dommuroj, ni planis nian ĉiujaran konkurson – ne permesita de niaj gepatroj – sed tamen – ĉiujare ĝi okazis. Ni konkursis pri tio, kiu unue sukcesos nudpiede ĉirkaŭkuri la domon sur senneĝa randumo, nur kelkajn centimetrojn larĝa. Oni ne rajtis treti sur la restantan neĝon. Ĉiuj ja ne sukcesis kaj pro tio ni daŭrigis la konkurson per nudpieda ĉirkaŭkurado sur la glacia neĝo. Li aŭ ŝi, kiu ĉirkaŭkuris la domon plejmultfoje, estis nia heroo.

Kiam mi estis sufiĉe aĝa – 5–6 jara, por partopreni en la konkurso – tri infanoj el nia familio partoprenis. Kelkfoje kunestis eĉ najbaraj infanoj. Kvankam ni komencis la konkurson treege silentaj, por ke la gepatroj ne sciu, tamen nia bruon grandigis ĉiuforte, kiam unu el ni faris sian kuradon. Sed – nun la gepatroj aŭdis la bruon kaj divenis, kio okazas. Ili ekvenis eksteren kaj – laŭ la finnaj manieroj – ili ordonis la tutan aron en la saŭnon, kiu ĉiam estis varma, eĉ se ne banvarmega. Tie ni varmigis niajn blu-ruĝajn piedojn en varmega akvo. Kurante ni tute ne sentis malvarmon. Laŭ mia memoro ni neniam malsaniĝis, kvankam pro la timo de

malsaniĝo la gepatroj ne akceptis la konkurson.

La printempo venis, degeligis neĝon kaj glacieron. Ni atentis treege serioze naturon, kaj migrobirdojn kaj plantojn. Birdoj vintron ĉerestantaj: pigoj, kornikoj, paruoj kaj bombiciloj komencis serĉi partnerojn. Ili ne plu estis dependaj de homdonitaj nutraĵoj. Ili transloĝiĝis al arbaroj. Ni rigardadis la ĉielon aŭskultante, ĉu jam aŭdiĝas printempaj trumpetoj: "Hoo-hoo-hoo", kantoj de cignoj, kiuj kutimis transflugi nian lokon ale al malpliprosima nordparto. Gruoj transflugis preskaŭ ĉiam silentaj, sed ilia flugado – plugilforma – estis treege interesa. Gruoj restis sur proksima marĉo, kie ili dancis, ludis siajn trumpetojn, nestis kaj manĝis ranojn.

Ni atendis la alaŭdojn, kiuj alveninte arkoflugis alte super la grenkampoj, kvivitflugetis, flugilbatis samloke longan tempon kaj subite plonĝoflugis suben per kunmetitaj flugiloj. Oni ja diras pri la alveno de somero: *Ekde alveno de alaŭdoj unu monaton, post fringoj duonmonaton, post motacil-alveno nur iom da tempo, jen somero – venis hirundoj.*

La unuaj tusilagoj subrigardis singarde jam tiam, kiam troviĝis nur malgrandaj senneĝaj lokoj. Ho! kiel mi ŝatis ĉi tiujn flavajn floretojn, vizitkartojn de printempo. Finnlingve oni nomas ilin "folio de vidvo". Pro la nomo de la floro ni ne kutimis kunporti ilin hejmen, nek botaniki kaj sekigi ilin sub presilo por uzi ilin por salutkartoj. Iam mi faris tion, sed pro la konsilo de mia fratino mi neniam sendis miajn memfaritajn belajn salutkartojn – tusilagajn.

La vera printempo komenciĝis tiam, kiam betuloj vestis sin en helverdaj burĝonoj, "en mus-oreloj", kiel ni nomis betulburĝonojn. Ili balanciĝis en printempa vento, invitis eksteren por flari printempan odoron, iom rezinan. La suno brilis tra la branĉoj kaj aŭdiĝis: kŭooovi-kŭooovi-kŭooovi – la kurlo kantis sur la proksima lago.

Tio okazis antaŭ multaj jaroj en norda Finnlando, sed la sama intensa atendado de printempo ĉeestas daŭre ĉe mi. Rigardante glacio-kovrilon sur mia pado, mi ne povas preterpasi ĝin sen piedbati, por dispecigi ĝin – por ke eĉ iom plirapidigi la printempon.

Printempajn salutojn, Aira Kankkunen

Pär Lagerkvist

– gasto ĉe la realo...

Pär Lagerkvist 1854–1923 estis la filo de la fervojisto Anders Johan Lagerquist kaj lia edzino Johanna. Pär Lagerkvist havis ses pli maljunajn gefratojn kaj ili kreskis ĉe la stacidomo en Växjö.

En sia junaĝo li studis en Upsalo, en Danio, Francio kaj Italio. En lia infanaĝa hejmo ekzistis nur du libroj, la Biblio kaj la himnaro. En lia junaĝo, Pär Lagerkvist kontaktiĝis kun pli novaj ideoj, kiuj estis malproksimaj de la mondkoncepto de la pietismo, kiu karakterizis lian infanaĝon.

Li ŝanĝis la literumon de sia familia nomo de -qu- al -kv- kiam li kontaktiĝis kun la fervora propagandanto de nova literumo, Josef Fredbärj. Tio estis kiam Pär Lagerkvist laboris kiel instruisto en Växjö komence de la 20-a jarcento.



En 1951 li iĝis Nobel-premiito, "Por la arta potenco kaj profunda sendependeco, kun kiuj li serĉas respondojn al la eternaj demandoj de homo en sia poezio".

Specialaj verkoj de Pär Lagerkvist kiuj signifis multon por mi estas:

La poemoj "Nun la suno malfiksas sian blondan hararon" kaj "Angoro". La romanoj "Gasto ĉe la realo" kaj "Mariamne".

Sed multaj aliaj verkoj de Pär Lagerkvist indas preni en koron kaj kial ne nun. Nun kiam "la suno malfiksas sian blondan hararon" en la tempo de printempo 2023. Kial ne promeni sub la varmigaj radioj de la printempa suno kaj bonvenigi la printempajn florojn, kiuj nun luktas por lumigi nian vojeton... lasu la koron bati por la printempo...

/Ingegerd

Nun la suno malfiksas sian blondan hararon

poemo de Pär Lagerkvist



Nun la suno malfiksas sian blondan hararon
en la unua horo de tagiĝo
kaj etendas ĝin sur la printempon de la tero
kie briletas mil floroj.

Ŝi malsekigas ĝin penseme en refreŝiga roso,
en la humidaj kaŝejoj de la floroj,
ŝi milde malligas ĝin de la rozaj dornoj,
sed hezite, distrite, kiel en sonĝo.

Ŝi lasas ĝin karesi arbaron kaj herbejon,
ŝi lasas ĝin flugi en la vento.
Nun ĝi karesas la infanojn en ilia lito
kaj la maljunajn sur malglataj vangoj.

Sed ŝia penso forestas de ĉio;
kion povas ĉi tiu ĝojo utili?
Ŝi sonĝas inter miloj da steloj,
kiuj pligrandigas la enigmon de la vivantoj.

Ŝi malfiksas sian hararon kaj etendas ĝin
en la beata horo de la mateno;
kaj sonĝas inter mondoj antaŭe foririntaj
kaj novaj kiuj sopirante briletas.

Nu löser solen sitt blonda hår
i den första gryningens timma
och breder det ut över markens vår
där tusende blommor glimma.

Hon väter det tankfull i svalkande dagg,
i blommornas fuktiga gömmen,
hon lossar det varligt från rosornas tagg,
men tveksamt, förströdd, som i drömmen.

Hon låter det smeka skog och äng,
hon låter det fara för vinden.
Nu smeker det barnen i deras säng
och de gamla på skrovliga kinden.

Men hennes tanke är borta från allt;
vad kan denna glädje båta?
Hon drömmer bland stjärnor som tusenfalt
förstora de levandes gåta.

Hon löser sitt hår och breder det ut
i morgonens saliga timma;
och drömmer bland världar som gått förut
och nya som långtande glimma.

Oldaj mezuriloj

de Lasse Granat

Longomezuriloj

Antaŭ la enkonduko de la metra sistemo 1878 ni havis sistemojn por mezur- kaj pezunuoj kiuj havis radikojn el la mezepoko.

Mezuroj kaj pezroj estis malsamaj en diversaj landoj kaj ankaŭ en diversaj landpartoj kaj malsamaj por diversspecaj varoj.

La mezuroj ofte asociiĝis kun korpopartoj kiel "tum", colo, (egale longa kiel la plej ekstera parto de la dikfingro (sv. "tumme")), "fot", futo, (egale longa kiel la piedo (sv. "fot")) aŭ "aln", ulno. "Aln" estis la mezuro por la subbrako de la kubuto al la fingropintoj.

Ĉe la bildoj sube oni vidas faldeblan mezurilon, kiu havas kvar malsamajn skalojn: "Londona colo, Dana colo, milimetroj kaj 'olda' sveda colo (antaŭ 1878)".

C.E. Johansson en Svedio farigis mezurpecon, kiu estis 25,400 milimetrojn kaj proponis ke kaj Anglio kaj Usono uzu tiun mezurilon kaj tiu konfirmiĝis kiel internacia normo en la jaro 1933.



En la jaro 1605 oni decidis ke la "aln", kiu estis konservita en la vestiblo de la preĝejo en Rydaholm, servus kiel nacia normigilo por la tuta Svedio. La longeco de ĉi tiu "aln", 59,38 centimetroj, poste validis por la sveda "aln" ĝis 1878.

Olda pesilo: Pesbrako

Pesbrako estis la plej ordinara tipo de pesilo, kiu estis uzita kaj en mastrumado kaj en foirejoj, ĉar ĝi estis simple konstruita kaj ne postulis apartajn pezajn. La uzado estas spurebla jam en la vikinga epoko. Pesbrako ordinare estis konstruita el fero aŭ el ligno. Ligna pesbrako ofte havis plumbon en la kontraŭpezo.

Iom alia uzado de la pesbrako estis kiel batarmilo. Estis multaj okazoj por uzi perforton en foiroj kaj similaj lokoj, kaj tie oni uzis pesbrakojn kiel atakilojn.

La pesbrako en la bildo povis esti uzita por pezroj ĝis ĉirkaŭ 10 kilogramoj.



Tramoj en Gotenburgo

de Ingegerd Granat



Mi aŭdis en la radio antaŭ kelkaj tagoj ke nun, en multaj lokoj en Gotenburgo eblas nur veturi per tramo kun rapideco de 5 km/h. La spuroj danĝere enprofundiĝis en ĉi tiuj lokoj. Tramoŝoforo diris, ke "ĝi ne iras pli rapide ol se vi marŝas".

La kialo supozeble estas, ke la grandaj konstruadoj okazantaj en la urbo pro "Västlänken" ĝenis la grundon en ĉi tiuj lokoj, diras multaj, kiuj kontraŭas la decidon konstrui "Västlänken".



Sed mi pensas, ke eble ni transiru al la jaro 1879, pli precize al la 24-a de decembro, kiam inaŭguriĝis la ĉevaltramo de Gotenburgo.

Posttagmeze okazis granda kunveno de gazetuloj kaj aliaj eminentaj civitanoj de Gotenburgo en parko Brunnsparken. Inter aliaj, la guberniestro, grafo Ehrensvärd ĉeestis. La anglo Dawidsson ĉeestis kiel reprezentanto de la tramoj de Gotenburgo. Je la kvara horo posttagmeze, la unua kaleŝo forruliĝis, la celo estis Stigbergsliden kaj Henriksberg, kie gazetara konferenco estis okazonta kun postaj festadoj kun paroladoj, inkluzive de la guberniestro Ehrensvärd. La anglo esprimis promeson pri malmultekosta vojaĝo, oni povis vojaĝi por 10 oeroj.

La tramo en Gotenburgo en tiu tempo estis ĉefe angla intereso ĉar angla firmao prizorgis la komercon.

En la sama tago, kiam oni povis legi la raporton pri la malfermo en Göteborgs-Posten, oni povis vidi ankaŭ reklamon en la "Göteborgs Spårvägar" kie oni diris, ke la unua kaj ankaŭ la sola linio inter

Brunnsparken kaj Stigbergliden forveturos ĉiun dek-kvinan minuton. La unua regula veturo foriris de Stigbergliden je 7:30 matene.

Tuj ekestis kelkaj pliaj linioj kun ĉevaltrenitaj tramoj kaj oni ĝenerale povas diri, ke ekde tiam ĝis nun, la linioj iom post iom plivastiĝis ĝis la linioj, kiujn ni havas hodiaŭ.

En 1884 ekzistis 23 ĉaroj, 40 koĉeroj kaj direktistoj kaj 75 ĉevaloj. Antaŭ la fino de la ĉevala tramepoko, la ĉevaloj tiris iom pli ol du milionojn da pasaĝeroj jare.

Ne estis haltejoj en tiuj tagoj, sed la koĉero haltis, kiam iu petis lin. Tamen, ne sur krutaj deklivoj. Somere, kiam estis varmege, la ĉevaloj portis sur la kapo specon de sunĉapelo. La ĉevaloj estis la malforta ligilo en la kunteksto. Se ili malsaniĝis, la vojaĝoj fariĝis malpli oftaj. Aliaj problemoj estis konservi la horaron. Se tio ne estus farita, la koĉero povus esti rapide eksigita.

La grandurbo de Gotenburgo transprenas la agadojn de *The Gothenburg Tramways Company* en 1900 kun 160 ĉevaloj.

Elektroinĝeniero Sigfrid Edström, edukita ĉe Chalmers, estis dungita. Baldaŭ la ĉevaloj estis anstataŭigitaj kaj la lasta ĉevalmova tramo funkciis en la aŭtuno de 1902 kaj la ĉevaloj estis venditaj kaj la fiera epoko de 23 jaroj finiĝis per tio.



Artikeln är en del av en serie artiklar om Göteborg i anledning av 400-årsjubileet.

Projekto de Zamenhof pri reformo de la jida lingvo kaj gramatiko de Torben Svendsen

La afero fakte nur nerekte koncernas Esperanton kaj ties afero, sed tamen montras la bonajn intencojn de L.L. Zamenhof por helpi kaj solvi lingvajn problemojn.

La projekto de Zamenhof, pri reformo de la jida lingvo, kaj alfabeto – estis neniam eldonita, sed li uzis ĉ. tri jarojn kaj influis iom en la formado de la nuna jida lingvo – kio estas skribita per hebreaj literoj – sed kun miksita vortaro kaj kun la prononcado laŭ la germana kaj hebrea influo.

La neŭtrala internacia lingvo, Esperanto, por la tuta homaro estas la plej grava por lia vivo, koro kaj animo, kaj dum sia tuta vivo li tute laboradis por ĝia harmonia evoluo al la bono de la tuta homara evoluo.

**) ĵargonoj = miksitaj lingvoformoj, ĉefe hebrea-germana, kiuj troveblas en la jida*

L.L. Zamenhof opiniis, ke oni devas reformigi la jidan gramatikon. Li ankaŭ volus anstataŭigi la hebreajn literojn per okcidentaj. Dum tri jaroj li okupiĝis pri la afero.

Zamenhof neniam publikigis siajn proponojn libre, sed nur gazete. Sekvis polemiko en la sekvaj gazetoj. Pro la kontraŭaj opinioj Zamenhof lasis la aferon.

Disaj partoj el la ideoj de Zamenhof:

[...] ankaŭ la lingvo de la judoj posedas sian difinitan kaj severan gramatikon. Alie ne povas esti, kompreneble, ĉar, sen tio, unu judo la alian ne komprenas.

[...] Kaj kaŭzas, ke niaj ĵargonoj* skribistoj opinias, ke judlingve oni povas skribi

libervole, kaj ju pli oni sin retiras de la efektiva popolĵargono, despli la lingvo fariĝas komprenebla kaj ĝusta

[...] Bona gramatiko kaj konvena vortaro de ĵargono farus la lingvon, fine, atingeble facila por ĉiu komencanto

[...] ni devas antaŭ ĉio enkonduki por la ĵargonon la latinajn literojn.

[...] Kaj ne forgesu ke la ellerno de la latina alfabeto estas por ĉiu eĉ neklera judo tre facila afero, dum la ellerno de la nuna juda ortografio, por tiu, kiu ne estas al ĝi kutimiĝinta de infaneco estas, eĉ al tre klera homo, malfacila afero.

[...] Tiel ekzemple la ĵargonaj gazetoj povos en unu el siaj fakoj komenci presi per latinaj

literoj, poste pligrandigi la nombron de tiuj fakoj, ĝis la legantoj fine alkiutimiĝos al la nova alfabeto, kiu kun la tempo tute elpuŝos la malnovan hebrean.



Dro L.L. Zamenhof en la Universala Kongreso en Bern 1913.

Trovu kaŝitajn animalojn en jenaj frazoj

B.v. trovi la animalojn ... , , , , ,  ... de **Josef Kříž**

Temas pri iom malfacila, sed tre interesa tasko ... tamen mi kredas, ke ne por vi ... La solvo troviĝas en la lasta paĝo.

Ekzempla frazo: "Atestu do, ke mi ne kaŭzis ĉi tiun aferon." Solvo: **Atestu do**, ... = testudo. Notu ke la trovota vorto povas etendiĝi trans vortinterspacon.

1. Ĉiuj gepatroj, nepre sciu: rokaro estas tre interesa natura vidindaĵo, sed tre danĝera por neobeemaj infanoj.
2. En metala aloj, kiun oni preparas por produktado de moneroj kaj medaloj, neniam manku niklo kaj kupro.
3. Vi certe lernis en lernejo, mia filineto kara, neolitiko daŭris kelkajn milionojn da jaroj.
4. Ho ve! Sperto estas ĉiam tre grava en kiu ajn faka laboro.

5. Tre fama pola esperanta verkisto Kazimierz Bein, kiu verkis sub la pseŭdonimo Kabe, loĝis dum sia vivo ankaŭ en Krakovo.

6. Tri niaj konataj E-amikoj: sinjoroj Norbert Karbe el Pirna, Dieter Dungert el Magdeburg kaj Josef Kříž el Ústí loĝas en la urboj, kiuj situas apud la sama rivero (Elbo) – do, ili estas ofte nomataj en Esperantujo "samriveranoj".

7. Dum somera ferio ni ofte ekskursas – tiam nia hobbio ĉiam estas viziti grotojn kaj enlande kaj eksterlande.

8. Sur la fenestron frapas eroj da neĝo la tutan nokton regule kaj forte.

9. Instruisto de matematiko minacas al lernanto: Bone devas eĉ ci koni onojn por praktiki sukcese bazajn matematikajn operaciojn.

10. Laborema slava tribo volis, ke ĝin gvidu – trovi novan landon – la maljuna saĝulo prapatro Ĉeĥ (Ĉeĥ).

11. En televido ni spektis, ke oni uzis tre maldikajn folietojn da oro tute normale por orumi internajn skulptajn ornamaĵojn de praga Nacia teatro.

12. Tuta aŭskultantaro, pro tre longa prelego jam velka, proponis, ke preleganto mallongigu ĝin.

13. Mia japana E-amiko s-ro Atsuo Kaŝijamu ŝoforas sian aŭtomobilon Honda rapide, sed tre sperte kaj sendanĝere

14. Vizitante regule golfludejon, situita en proksima ĉirkaŭaĵo de la fama banurbo Karlovy Vary (Karlsbad), ni volonte ofte duope golfludas.

15. Kiu el vi garantias promesi miozotflorojn el via ĝardeno, por mia patrino okaze de ŝia nomtago?

16. Komparu oron kaj arĝenton – simple vi vidos diferencon, ekzemple jam en ilia koloro.

17. Dum promenado tra la urbocentro de Prago, ni ofte renkontas kamelotojn kun freŝe eldonita gazeto "Praga vespergazeto".

18. En nova filmo, kiun oni ĵus prezentas tutan semajnon en ĉi tiea kinejo, rolas laŭ mia opinio plej bele fantomo.

19. Mi konstatas koncize: broso estas utila hejma ilo, ofte uzata ekzemple por forigi harojn kaj etajn malpurigaĵojn de la vestaĵoj.

20. Sur la tablo estas freŝe bakita kuko – longan tempon mi ne manĝis tiom bongusta.

21. Se vi kiam ajn tostas, mia kara amiko, bonvolu: pokalon vi devas ĉiam fintrinki ĝisprofunde.

22. La mesaĝo ĝusta: l'posedanto de la gepatra domo fariĝis ilia plej maljuna filo.

Juna vizitanto



Linn, la nepino de Ingegerd kaj Lasse Granat, vizitis la bibliotekon en Stannum.

Certe ŝi estas la plej juna vizitanto. Daŭros ĝis ŝi povas legi Pipi Ŝtrumpolonga.

Bert Schumann informas pri kursoj en Greziljono, Francio

PRINTEMPoS

Studperiodo 'PRINTEMPaS' de la 14^a ĝis 22^a de aprilo. Vidu rete: gresillon.org/printempo.
Kursoj kun Mireille Grosjean, Paweł Fischer-Kotowski, SZILVA Szabolcs aŭ Marion Quenut.



Sekva programo en 2023:

2023-apr-24/30	<u>Ĥora (korusa) renkonto</u> kun Bernard Bigonnet, Anne Le Bot
2023-apr-24/30	<u>BEMI-Semajno</u> de esperantlingvaj biciklistoj kun Olivier Buisson
2023-jul-02/07	4-a <u>Verda Naturisma Semajno</u> kun INOE
2023-jul-07/17	7-a <u>Maratona Esperanto-kurso</u> kun Duncan Charters, Radojica Petrović, Szilva Szabolcs, Andrea Bertrand, ILEI-ekzameno
2023-jul-07/17	35-a <u>Internacia E-Konferenco</u> post OSIEK pri variaj temoj
2023-jul-18/25	96-a <u>Kongreso de SAT</u>
2023-jul-25/aŭg-04	44-a <u>Renkonto de Esperanto-Familioj</u> REF
2023-jul-25/aŭg-04	13-a <u>Festa Semajno por infanoj kaj familioj</u> , renkonto de la Verdaj Skoltoj
2023-aŭg-07/17	9-a <u>Interŝanĝoj de scioj kaj faroj</u> (franclingve)
2023-okt-16/22	<u>Ĥora (korusa) renkonto</u>
2023-okt-23 / nov-02	12a <u>AŬTUNAS</u> , la Esperanto-ferioj kun kursoj

Por ĉia demando, skribu al kastelo@gresillon.org aŭ telefonu al +33 - 2 41 89 10 34 (respondilo).

Bonvenon en via Esperanto-kastelo

Somerumu en Gotenburgo

- ☼ Se vi ŝatas la arkipelagon
- ☼ Se vi ŝatas botanikan ĝardenon
- ☼ Se vi ŝatas la kulturon
- ☼ Se vi ŝatas junularajn gastejojn
- ☼ Se vi ŝatas la gotenburganojn
- ☼ Se vi ŝatas esperantan intensan somerkurson (19–22 junio)
- ☼ **Venu al Gotenburgo!**



Somera kurso en tri niveloj en Gotenburgo

19–22 junio, inter la 10^a h – 15^a h.

Kostas 400:– Por junuloj 200:–

Plia informo kaj aliĝo al Siv Burell: siv.burell@gmail.com

Jen mia teksteto honore de Lars

amike, **Sascha Ralf**

Mi renkontis Lars la unuan fojon antaŭ pli ol 30 jaroj. Kaj ĝis hodiaŭ tiu renkonto influas mian vivon ĉiutage. Kiel dek-kaj-iom-jarulo mi venis al lia kurso de Esperanto en la popolaltlernejo de Karlskoga, lernis Esperanton en internacia etoso, la svedan en la klasĉambro kaj humanismon kaj kanti entuziasme eĉ se malbone rekte de Lars.

Post tio neniam mia vivo restis la sama kaj lia amo al Esperanto plukreskas ĉe mi ĉiun tagon. Nun mi gvidas la Esperanto-Stacion, ĉe Berlino klopodante agi en la spirito de Lars,

humanisme, homame kaj daŭre kantante malbone sed entuziasme.

Restu pace kara Lars, via spirito vivas kaj inspiras multloke, multkore. Kun amo kaj dankemo por ĉiam,

/Sascha



Esperanto-Stacio
esperantostacio.com
+49-176-24714203

Trovu kaŝitajn animalojn – SOLVO

1. Ĉiuj gepatroj, nepre **SCIU: RO**karo ...
2. ... neniam man**KU NIKLO** kaj kupro ... [sed la ĝusta nomo de la metalo estas "nikelo" *n.d.red.*]
3. Vi certe lernis en lernejo, mia filineto **kARA, NEO**litiko ...
4. Ho **VE! SPERTO** ...
5. Tre fama pola esperanta verkisto Kazimierz Bein, kiu verkis sub la pseŭdonimo **KABE, LO**ĝis ...
6. ... do, ili estas ofte nomataj en Esperantujo "samriver**RANOJ**"
7. Dum somera ferio ni ofte ekskursas – tiam nia hobbio ĉiam estas vizi**TI GRO**tojn ...
8. Sur la fenestron fra**PAS EROJ** ...
9. Instruisto pri matematiko minacas al lernanto: Bone devas eĉ **CI KONI Onojn** ...
10. Laborema slava tri**BO VOL**is, ...
11. En televido ni spektis, ke oni uzis tre maldikajn folietojn da oro tute norma**LE POR Orumi** ...
12. Tuta aŭskultantaro, pro tre longa prelego jam vel**KA, PRO**ponis, ...
13. Mia japana E-amiko s-ro Atsuo Kaŝija**MU ŜO**foras ...
14. ... ni volonte ofte duo**PE GO**lfludas.
15. Kiu el vi garantias prome**SI MIO**zotflorojn ...
16. Kom**PARU O**ron ...
17. Dum promenado tra la urbocentro de Prago, ni ofte renkontas **KAMELO**tojn ...
18. ... rolas laŭ mia opinio plej **BELE FANTO**mo.
19. Mi konstatas konci**ZE: BRO**so ...
20. Sur la tablo estas freŝe bakita **KUKO – LO**ngan ...
21. Se vi kiam ajn tostas, mia kara amiko, bonvo**LU: PO**kalon ...
22. La mesaĝo ĝus**TA: L'PO**sedanto ...